

# Argentina E-Vento

Oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo  
13-a jaro n-ro 35                      oktobro / decembro 2008 [4]

## AEL Jara Asembleo



La 1-a de novembro 2008, en Bonaero, okazis la Jarasembleo de AEL.  
Nova Estraro kaj nova redaktoro estis elektitaj.  
Hispanlingvan informon vi trovos sur p. 9

# Argentina E-Vento

13-a jaro n-ro 35 okt / dec 2008 [ 4 ]  
Oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo  
[Argentina Esperantisto 1917-1995]

Aperas kvaronjare/*Trimestral*

Dissendita al 31 landoj - Interŝanĝo dezirata

## Redaktoro -ekde 1996-

Rubén T. Diaconu Tkachenco  
Calles 119 y 122  
AR-H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña, Chaco  
Argentino  
rubendiaconu@yahoo.com.ar

## Kunlaborantoj:

Rubén Sánchez: [esperanto@neunet.com.ar](mailto:esperanto@neunet.com.ar)  
Emmanuel Maggiori:  
[emmanuelmaggiori@gmail.com](mailto:emmanuelmaggiori@gmail.com)

*Pri la subskribitaj artikoloj respondecas iliaj aŭtoroj kaj ili ne nepre reflektas la opinion de AEL aŭ de la redaktoro.*

## Argentina Esperanto-Ligo

Fondita la 12-an de aprilo 1941  
Re-fondita surbaze de AEL-AEA  
la 9-an de decembro 1995  
TTT-ejo: [www.esperanto.org.ar](http://www.esperanto.org.ar)


## AEL-Estraro

Prezidanto: Silvia E. Rottenberg  
Vicprezidanto: Fernando Inocencio  
Secretario: Jorge E. Cabrera  
Vicsekretario: Christian Hummel  
Kasisto: Daniel Cotarelo García  
Vickasisto: Cecilia Prudkin  
Voĉdonanto: Julio Guasch  
Voĉdonanto: Diego Cassini

## Komisiitoj

Instruado: Rubén L. Sánchez  
Libroservo: Jorge Cabrera  
Disvastigado: Silvia Rottenberg  
Arĥivo: Roberto Sartor  
UEA-Komitatano A: J. Cabrera  
Kotizperanto, p/AEL –  
UEA-Ĉef-delegito: Rubén L. Sánchez  
Komitatano A de TEJO: Cecilia Prudkin  
Argent-EJO: Daniel M. Lucero  
Pasporta Servo: Silvia Rottenberg  
ttt-ejo: Ary Borenzweig  
argent-reto: Pablo León

# El la Redaktejo



## Karaj legantoj.

Ĉi numero prezentas i.a. la plej interesajn novaĵojn pri Esperanto tra la lando kaj tra la mondo. Kaj tiel ni finas la ĉijaran redakt-laboron.

Bonan legadon!

Via Redaktoro

# Enhavo

## AEL Jar-Asembleo

*sur kovrilpaĝo partoprenantoj de la Asembleo*

El la Redaktejo..... 2

Día del Esperanto..... 3

Análisis / Noticias /  
*Hispanlingva rubriko*..... 5

Amerike..... 13

Internacie..... 16

Anoncoj / Dankesperimoj..... 19

Distraĵo / Por la animo / Literaturo..... 20

# Argentina E-Vento

laŭ PDF-versio ĉe:

[www.gazetejo.org/node/651](http://www.gazetejo.org/node/651)

Via E-revuo ankaŭ povas aperi en ttt-ejo

**La Esperanta Gazetejo:**

[www.gazetejo.org](http://www.gazetejo.org)

# Lázaro Luis Zamenhof...

## iniciador de la lengua internacional

**Ludwik Lejzer Zamenhof,  
Bialystok, (PL),  
15-12-1859 - 14-04-1917.**

**Médico oftalmólogo, creador de la  
lengua internacional esperanto.**

*(Extraído de Internet)*

### Sus orígenes

**N**ació el 15 de diciembre de 1859 y recibió el nombre hebreo de El'azar, transcrito en los documentos rusos como Lázaro; siguiendo la costumbre, se le dio también un segundo nombre cristiano con la misma inicial, Luis. El muchacho fue a la escuela de Bialystok entre 1869 y 1873, y desde diciembre de 1873 hasta julio de 1879 al "Instituto Alemán" de Varsovia. Después de dos años de estudio en la Facultad de Medicina de Moscú y cuatro en la de Varsovia, recibió su título de médico en la especialidad de oftalmología, que terminó de cursar en Viena (1886).

El joven Zamenhof tenía un talento especial para las lenguas; hablaba tres de forma fluida: ruso, polaco y alemán; podía leer tres sin dificultad: latín, hebreo y francés, por no hablar del judealemán (yidish), que estudió durante dos años y sobre el que elaboró una gramática completa. De griego, inglés, italiano y algunas otras lenguas, tenía sólo conocimiento básico. Pero siempre consideró el ruso como su lengua materna (sólo en ella y en esperanto escribió poesía).

Este poliglotismo era sólo el reflejo de las condiciones en que vivía y que no pudieron dejar de influir en el pensamiento de un joven sensible.



En Bialystok vivían en 1897 un 66% de judíos, un 18% de polacos, un 8% de rusos, un 6% de alemanes y un 2% de bielorrusos.

Se casó en 1887 con Klara Zilbernik y hasta 1897 buscó, primero en Varsovia, luego en otros lugares como Herson y Grodno, clientela suficiente de la que vivir. A principios de 1898 se instaló definitivamente en el barrio judío de Varsovia, donde ejerció hasta su muerte, el 14 de abril de 1917. La profesión médica le proporcionó muchos más sinsabores que beneficios; debido a la pobreza de sus clientes tenía que visitar diariamente entre 30 y 40 pacientes, a pesar de lo cual ganaba sólo lo justo para garantizar una vida modesta a su familia.

## Nacimiento del esperanto

Habiendo crecido en la ciudad de Białystok (que en aquel entonces formaba parte del Imperio ruso, pero en la actualidad pertenece a Polonia), en donde se hablaban muchos idiomas y había dificultades para la comprensión entre las diversas culturas. Esto le motivó para buscar una solución al problema, y con el paso de los años fue desarrollando el esperanto, en un proceso que fue largo y laborioso.

Continuó con sus esfuerzos a pesar de que en 1879 apareciera el volapük, resultado del trabajo de otra persona, Johann Martin Schleyer, en el proyecto de crear una lengua internacional. Zamenhof aprendió volapük, pero los defectos de este idioma le motivaron aún más para proseguir con sus planes. Finalmente, en 1887 y con la ayuda económica de su suegro, logró publicar un folleto en el que exponía los principios de la nueva lengua en el *Lingvo Internacia*. *Antaŭparolo kaj plena lernolibro* (Lengua Internacional. Prefacio y libro de texto completo), con el seudónimo de Doktoro Esperanto (que en español es Doctor Esperanza). Palabra que posteriormente

acabó por convertirse en el nombre de su creación lingüística. Esta publicación es denominada posteriormente *Unua Libro* (Primer Libro).

Mediante los cuatro folletos que aparecieron respectivamente en ruso, polaco, francés y alemán, y firmados con el pseudónimo Dr. Esperanto, sometió su proyecto de "lengua internacional" a la crítica de los expertos, con la promesa de que, al cabo de un año, la perfeccionaría con las mejoras propuestas. Envío esos folletos a multitud de revistas, gacetas, sociedades y periódicos europeos. Puso anuncios en periódicos rusos y polacos. Empleó, con el consentimiento de ella, la dote de su esposa para lanzar, entre los años 1888-1889, una serie completa de libros: *Dua Libro* [Segundo Libro]; *Aldono al la Dua Libro* [Suplemento del Segundo Libro]; *Neĝa blovado* [Tormenta de nieve] y *Gefratoj* [Hermanos], traducidos por A. Grabowski; las traducciones del Segundo Libro y del Suplemento; *Meza Vortaro Germana* [Diccionario Medio Alemán]; *Plena Vortaro Rusa* [Diccionario Completo Ruso]; manuales en inglés y sueco; *Princino Mary* [Princesa Mary], traducido por E. von Wahl; *Adresaro* [Directorio]; y proporcionó el dinero necesario para editar las obras divulgativas de L. Einstein y H. Phillips. A finales de 1889, debido, sobre todo, a tan grande actividad editorial estaba completamente arruinado. A partir de ese momento, aunque siguió siendo hasta 1905 el motor principal del movimiento, la divulgación dependió materialmente de los recursos económicos de los primeros seguidores.

En 1905 para el primer Congreso Mundial de Esperanto (Boulogne-sur-Mer, Francia) Zamenhof presenta el *Fundamento de Esperanto*. Publicación que es declarada, el 9 de agosto, como la descripción oficial del idioma en el cuarto artículo de la Declaración de Boulogne. Es considerado por tanto el reglamento esencial y obligatorio del esperanto y es por lo tanto intocable.

## Muerte

El Dr. Zamenhof murió en Varsovia, el 14 de abril de 1917.



El Primer Libro sobre esperanto, en ruso

# Novedades del esperanto y su entorno

**AEL y diversas actividades del esperanto han sido reflejados en medios de comunicación de nuestro país y del exterior**

## ■ Difusión

## 4ª Expo Educativa 2008

**La 4ª edición de la "Expo Argentina Educativa 2008" se llevó a cabo del 14 al 16 de agosto de 2008, en el pabellón Azul del predio "La Rural" de la ciudad de Buenos Aires.**

**L**a Expo volvió a acercar al público, toda la oferta de las instituciones de enseñanza pública y privada de todo el país.

Este año, como en su primera edición en el 2005, el esperanto estuvo presente y se difundió en su stand propio que fuera ofrecido gratuitamente a tal fin.

Durante los tres días de la muestra los visitantes recibieron información sobre las distintas propuestas educativas del país a través de los stands expositores, conferencias y una rica agenda de actividades artísticas y culturales.

"Expo Argentina Educativa", como siempre, estuvo dirigida a alumnos de 4º y 5º año de colegios públicos y privados que están prontos a insertarse en el mundo universitario.

También a profesionales que continúan perfeccionando sus conocimientos; a educadores que se actualizan; a institutos educativos nacionales y extranjeros; a escuelas y empresas que trabajan en pos de la educación.

Declarada, desde su primera edición, de interés educativo por el *Ministerio de la Educación, Ciencia y Tecnología de la Nación*, el *Ministerio de Educación del Gobierno de la Ciudad de Buenos Aires* y por la *Dirección General de Cultura y Educación de la provincia de Buenos Aires*, "Expo Argentina Educativa" es el gran espacio de encuentro de la educación y al alcance de todas las personas.

Fue realmente exitosa la participación del esperanto en la "Expo Argentina Educativa



Vista general del predio

2008". Más de mil folletos fueron distribuidos a los visitantes del stand "Esperanto Argentina" y se posibilitó también el uso del "Auditorio Cuyo" para una conferencia alusiva, que fue brindada por Aneta Ubik.

Todo un éxito de los esperantistas de Buenos Aires, a quienes AEL agradece la voluntaria dedicación al servicio de la divulgación de la lengua internacional.



*Directivos de AEL y esperantistas bonaerenses*



*Afiche de la Escuela*



*Cecilia y Bernabé atendiendo el stand*

## Esperanto ĉe ekspozicio

**La Argentina Esperanto-Movado, partoprenis en la "4-a Argentina Eduka Ekspo" kun propra stando, por reklamado de la lingvo.**

Kun propra stando, esperantistoj el Bonaero sukcese partoprenis en la **4-a Argentina Eduka Ekspozicio**, por disvastigi la internacian lingvon.

Dum la ekspozicio la publiko informiĝis pri ĉiuj karieroj disponeblaj en universitatoj kaj lernejoj en Argentino, ĉefe en Bonaero-urbo.

La "Argentina Esperanta Lernejo" disdonis pli ol mil fakfoliojn pri Esperanto.

Volontuloj de la Argentina E-Movado en Bonaero deĵoris kaj kunlaboris por la sukceso de la ekspozicio.

## Buenos Aires. Clases mensuales de esperanto

**E**l sábado 6 de septiembre a las 16 hs. y con la asistencia de 8 jóvenes se iniciaron las clases de idioma esperanto, en la sede de la Asociación Buenos Aires de Esperanto, en la calle Paraguay 2357, Dto. 2, entre Larrea y Azcuénaga, Capital Federal.

Con la guía de Silvia Rottenberg y la colaboración de Aneta Ubik y Elena Morteo, las mismas son de carácter gratuito, solicitándose 10 pesos mensuales en concepto de bono-contribución para el mantenimiento de la Asociación.

El objetivo es brindar en un mes los conocimientos básicos necesarios para luego continuar la práctica en el curso/taller en forma presencial o a través de Internet.

Un siguiente curso comenzó el día 4 de octubre a las 16 hs, con una clase de introducción al idioma esperanto.

El sábado 18 de octubre, los esperantistas italianos Antonella y Claudio Mari, visitaron la sede de la asociación de esperanto y con alumnos y esperantistas locales compartieron un agasajo ofrecido con tal motivo.



*Profesores y alumnos participantes del encuentro con esperantistas italianos*

## La Rioja. Curso de esperanto

**L**eandro Tomé, esperantista de Brasil, estuvo en la ciudad de La Rioja, a fines de septiembre, participando en una reunión regional del movimiento esperantista.

Con este motivo el sábado 20, desarrolló un curso intensivo de idioma esperanto, en el local del Pasaje Segismundo Pelliza 795, en el centro de esa ciudad.

Como colaborador estuvo presente **Dante Díaz**, miembro de AEL y coordinador del grupo esperantista de Chamental.

## Visita de Eida Lima, en Buenos Aires

**P**ara participar en el “5° Festival de Yoga de Buenos Aires” (26-28 de septiembre, en el Etoile Hotel Recoleta), ha viajado **Eida Lima**, conocida esperantista del Brasil y jurista que trabaja en los Tribunales de Brasilia. Es también miembro de *Universala Esperanto-Asocio*, *Brazila Esperanto-Ligo* y el *Pasporta Servo*.

Eida, fue huésped de Aneta Ubik en su departamento y ha visitado la sede de la Asociación de Esperanto Buenos Aires. Arribó a nuestro país, deseosa de reunirse con los esperantistas, bailar tango y recorrer la ciudad.

Contactos: [eida.lima@gmail.com](mailto:eida.lima@gmail.com)

Para participar en este festival llegó además **Eimara Lima**, hermana de Eida, instructora de yoga y también esperantista.-

# Esperantista japonés en Argentina

**E**l Ing. Kunio Ueki es japonés y desde abril está radicado en Córdoba. Permanecerá en nuestro país durante los próximos dos años para poner sus conocimientos en nuevas tecnologías al servicio de las Pymes. Principalmente, trabajará en la aplicación del Internet al “e-business”, es decir, mercado electrónico, que va a contribuir a la exportación de productos cordobeses al extranjero. Kunio es el tercer voluntario que recibe la agencia ProCórdoba en el marco del Programa de Voluntarios Seniors que se encuentra enmarcado en el Convenio de Cooperación Técnica entre el gobierno de Japón y el de la Argentina firmado en 1979 y ratificado por nuestro país en 1981.

“A través del Programa de Voluntarios Seniors de Jica (Agencia de Cooperación Internacional de Japón), ProCórdoba se beneficia con el aporte de estos profesionales japoneses que transmiten sus conocimientos y experiencias en un área especializada”, indicaron desde la dependencia gubernamental abocada a la promoción de las exportaciones.

*“Los avances tecnológicos de la Argentina son tan rápidos como los japoneses, al menos en el campo de la informática; sólo en*

*cuanto a los equipos (hardware) o las infraestructuras, los de Japón están un poco más avanzados que los de Argentina”, nos dijo a los periodistas.*

El Ing. Kuni es un hombre muy culto que ha recorrido todo el mundo, especialista en computación...y se va a quedar en Argentina trabajando en PRO-CORDOBA, fomentando el comercio entre Argentina y Japón.

Estuvo también en Buenos Aires y se reunió con esperantistas locales.



*Silvia Rottenberg junto al Ing. Kunio Ueki*



# Las 4-as Jornadas de Mendoza



**E**l esperanto estuvo presente en las 4-as Jornadas Nacionales de Mendoza sobre “Desarrollo Local, Ciudadanía Mundial y Turismo Sostenible”. El evento se realizó en Mendoza y contó con el apoyo de la Universidad de Cuyo. En nombre del Movimiento Esperantista Argentino, viajó a esa ciudad Jorge Enrique Cabrera, quien ha participado en dos mesas de debate sobre educación formal, no formal y rol del esperanto en cuanto portador de conocimiento para los nuevos tiempos.

Nuestro Movimiento fue especialmente invitado para presentar una ponencia sobre el esperanto como lengua internacional y su relación con el turismo y las nuevas perspectivas que ofrece la actual “globalización”.

En las conclusiones de estas jornadas se ha aconsejado se tomen en cuenta seriamente las Resoluciones de la UNESCO con respecto a la adopción del idioma internacional esperanto como idioma auxiliar y neutral de la humanidad. Y de acuerdo a la facilidad de su aprendizaje y el alto valor educativo para el encuentro de culturas, más allá de toda barrera étnica e idiomática, comprobado a lo largo de cien años, se prevea su enseñanza progresiva como idioma optativo en todas las escuelas públicas y privadas del país.

## Asamblea Anual

### AEL realizó su 67º Asamblea

**E**l 1º de noviembre de 2008, siendo las 13:30 hs., en la Ciudad Autónoma de Buenos Aires, en la sede social de Bonaera E-Asocio, sito en la calle Paraguay 2357 Dpto 2, se reunieron los socios y simpatizantes de AEL: Aneta Ubik, Roberto Sartor, Rubén Luis Sánchez (Neuquén), Silvia Rottenberg, Livia Barth (Neuquén), Diego Cassini, Mónica Romano, Daniel Cotarelo García, Alfredo Juan Valle, Miriam Tabak, Julio Guasch, Jorge Enrique Cabrera, Inés Beaumont, Inés Mabel López, Alberto Auné, Fernando Inocencio, Elena Morteo, Cecilia Prudkin, Alcides Pieter Wentinck, y Christian Hummel. Firmas en ANEXO I.

En la apertura el Presidente de AEL, Ing. Alcides Wentinck, inició la sesión dando a continuación su informe. Entre otras consideraciones, relató los avances obtenidos durante el año respecto a la aprobación de la Escuela Argentina de Esperanto. Archiviándose su informe como ANEXO II.

Continuó con el desarrollo de la asamblea, el Secretario General de AEL, Sr. Jorge Enrique Cabrera. Se guardó un minuto de silencio en memoria los socios fallecidos: Dr. Marcelo Casartelli, Juan Varano y Carlos Uría.

Se mencionó los saludos enviados por René Arce, Rubén Diaconu, José Dioguardí, Nélida Monasterio, Frances Briel, Martín Aldasoro, Rodolfo Calógero, entre otros.

A continuación se leyó el Acta N° 15, del 13 de octubre de 2007, la cual fue aprobada por unanimidad.

El Secretario procedió a la lectura de su informe, el que pasó al archivo como ANEXO III. Asimismo leyó el informe de Tesorería, indicando que el saldo al 14 de

En Buenos Aires, la Liga Argentina de Esperanto, renovó su Comisión Directiva. Se analizaron diversas propuestas y pautas de trabajo.

de septiembre/08 es de \$ 254 (+ USD 100). ANEXO IV. A continuación el *ĈefDelegito*, Rubén Sánchez procedió a la lectura de su informe, archivado como ANEXO V. El Secretario dio lectura al informe enviado por el Redactor de nuestro órgano oficial, Sr. Rubén Diaconu, en el cual manifestó además su renuncia a dicho cargo, archivado como ANEXO VI.

Se hizo mención, por parte del Secretario, de las consideraciones expresadas en dicho informe.

Se procedió a continuación a la elección de las autoridades que integrarán la nueva Comisión Directiva. Se presentó una lista, la cual fue aprobada por unanimidad.

#### **Comisión Directiva**

Presidente: Silvia Rottenberg  
Vicepresidente: Fernando Inocencio  
Secretario General: Jorge Enrique Cabrera  
Pro-secretario: Christian Hummel  
Tesorero: Daniel Cotarelo García  
Pro-tesorero: Cecilia Prudkin  
Vocales: Julio Guasch (propuesto por BEA)  
Diego Cassini (propuesto por EAL)

#### **Comisionados:**

Instruado: Rubén Sánchez (provisório)  
Libroservo: Jorge Enrique Cabrera  
Disvastigado: Silvia Rottenberg  
Arkivo: Roberto Sartor



*Momento de pausa durante la asamblea*

Pasporta Servo-  
Landa Organizanto: Silvia Rottenberg  
Redaktoro de la revuo: Jorge E.Cabrera  
UEA komitatano A: Jorge Enrique Cabrera  
UEA *ĈefDelegito*: Rubén Sánchez  
UEA Kotizperanto: a designar  
TEJO Komitatano A: Cecilia Prudkin  
Argent-EJO: Daniel Marcelo Lucero  
A cargo de la página Web: Ary Borenzweig  
A cargo de Argent-retó: Pablo León

Se presentaron y debatieron las siguientes propuestas:

#### **2009: “Año de Zamenhof”.**

Por ser el 2009 el año del sesquicentenario del nacimiento del Dr. L. L. Zamenhof, se propuso declararlo “Año de Zamenhof”. Se sugirieron promover actividades y actos de difusión a lo largo del mismo, haciendo una

campana a fin de lograr la designación de lugares, aulas, edificios, calles, etc., con el nombre del iniciador del esperanto.

Luego de algunas consideraciones sobre acciones concretas a seguir como la colocación de un busto del Dr. Zamenhof, la propuesta fue aprobada por unanimidad.

### **2009: año de fortalecimiento interno. Propuesta.**

Considerando que existe la propuesta para que Argentina sea candidata como sede de la realización del Congreso Universal de Esperanto en el año 2012, se hace evidente la necesidad de generar una estructura logística y humana capaz de responder a dicho desafío.

Se resolvió encargar a la nueva comisión de AEL:

- 1.- Establecer los lineamientos necesarios para activar nuestro movimiento.
- 2.- Formar cuadros dirigentes y establecer una estrategia de información sobre el rol de las instituciones y su importancia como un nivel superior de organización.

Tal formación de cuadros dirigentes activos debería tener carácter prioritario tanto en AEL como en la escuela LEA, creación de AEL, como en BEA.

Por otra parte, Rubén Sánchez acotó que



*Alcides Wentinck presentando su informe*

según su parecer, no sería muy probable la realización del congreso en Argentina pero se consideró actuar teniendo en vista ese año. Si UEA no resolviera realizar el congreso de ese año en nuestro país, se efectuaría nuevamente tal ofrecimiento para los años siguientes inmediatos.

La propuesta fue aprobada por unanimidad.

### **Acción individual e institucional.**

Se hizo hincapié en que formamos parte de una institución, es decir colaboramos primero en la misma supervivencia de la institución (integramos sus cuadros dirigentes en forma concreta), así como en la persecución de sus objetivos mediante apoyo social y económico. Por eso, en las asociaciones es prioritaria la búsqueda de socios y de aportantes.

### **Propuesta.**

Se resolvió encargar a la comisión de AEL Comenzar una campaña de conscripción de socios de AEL y amigos de AEL ó amigos del esperanto que nos permita un crecimiento institucional tanto en lo social como en lo económico. Dicha campaña puede realizarse en conjunto con otras entidades y asociaciones (como LEA, BEA y otras).

La propuesta fue aprobada por unanimidad.

### **Objetivos de AEL. Rol de interlocutor ante instituciones privadas y públicas. Propuesta.**

Se resolvió poner de manifiesto en forma explícita el rol de AEL como el interlocutor válido ante instituciones privadas y públicas a fin de mostrar públicamente un solo interlocutor. Y se aconsejó exhibir tal carácter representativo tanto en papelería interna como en publicidad.

Se explicitó esto a fin de unificar en AEL el rol representativo (punto de entrada institucional amplio del movimiento esperantista), hasta tanto se defina en forma explícita un rol de AEL diferente del actual como entidad contenedora del movimiento esperantista.

Se resolvió facultar a la nueva Comisión Directiva de AEL a mantener relaciones permanentes con LEA y BEA y otras a fin de procurar se mantengan los lineamientos políticos de AEL así como líneas de acción con otras entidades (ej: LEA, BEA, etc) a fin de realizar acciones conjuntas tendientes a minimizar costos operativos y maximizar el resultado de los esfuerzos personales e institucionales, individuales y conjuntos. Ej.: cuenta bancaria, posibilidad de gastos e ingresos compartidos, publicidad común, utilización de una sede común, etc., según los intereses y características de cada institución.

Se propuso facultar a la comisión a reorganizar el armado y edición (papel y edición virtual) de nuestro órgano oficial *Argentina E-Vento*, así como la página de Internet y la lista de correo a fin de adecuarlo a los nuevos lineamientos.

Luego de algunas consideraciones sobre la necesidad de invertir en material educativo, la propuesta fue aprobada por unanimidad.

### **Cuota anual societaria de miembro individual.**

**Propuesta:** elevar la cuota a \$ 40 para el período en curso.

La propuesta fue aprobada por unanimidad.

Siendo las 15:40 y no habiendo más temas que tratar, se dio por finalizada la sesión de la asamblea.

**Jorge Enrique Cabrera, Secretario-redactor**  
(Extraído del Acta N° 16)

## **Ĉe la limo de la mondo...**

**M**i kreis novan blogon por paroli pri E-literaturo. Mi aldonos miajn proprajn verkojn kaj ankaŭ el aliaj verkistoj. Mallongaj poemoj, romanoj, kantaĵoj, ligiloj al interesaj ttt-ejoj rilatigitaj a la E-literaturo kaj kelkajn desegnoj kaj fotoj havos lokon tie.

Mi intencas aldoni originalajn verkojn kaj ankaŭ tradukitajn laborojn el ceteraj verkistoj.

La nomo de tiu ĉi blogo havas sian originon en la verko de granda aŭtoro Edmond Privat, "*Karlo*". Multaj el ni legis tiun belan verkon kaj mi speciale memoras kiam Karlo "vojaĝas" per sia menso kaj kredas esti "ĉe la limo de la mondo..."

Vi povas viziti tiun ĉi blogon ĉe:

**<http://limodelamondo.blogspot.com/>**

La unuaj poŝtoj jam aldonitaj temas pri kantaĵoj verkitaj de mi. Ankaŭ oni montras ligilon al "*Revo realigita dank' al Esperanto*" (verkita de Rubén Diaconu Tkachenco) kaj oni povas legi mallongan rakonton de Ergoto de Bonaero. Baldaŭ mi komencos aldoni la libron "*La Centa Simio*" de Ken Keyes Jr., kiu temas pri la nuklea minaco; kaj ankaŭ tradukitajn rakontojn de argentinano Luis Guaragna.

Oni dankos komentojn kaj ideojn por plibonigi la blogon. Kaj ĉu vi trovas erarojn? bonvolu ne heziti diri tion al mi. Mi esperas ankaŭ trovi vin "ĉe la limo de la mondo".

**Carlos Devizia, Buenos Aires**



Aŭroro, "ĉe la limo de la mondo".

# Amerike

## Kongresoj en Ameriko

### La Ĉefdelegito de UEA en Argentino partoprenis la Brazilajn Kongresojn

Rubén Sánchez, (Neuquén) estas la ĉefdelegito de UEA en Argentino, kaj tiel havis la eblon ĉeesti la Brazilajn Kongresojn en Fortaleza.

**F**ortaleza (portugale *Fortaleza* (fortikaĵo), ĉe la Atlantiko, estas la ĉefurbo de Cearao, nordorienta subŝtato de Brazilo. Je du gradoj sude de la ekvatoro, je altitudo ĉirkaŭ 21m, ĝi estas municipa centro de 313,8 km<sup>2</sup> de areo kaj 2.097.757 da enloĝantoj (urba denseco: 6.685,01 po km<sup>2</sup>). En ĝia aglomeraĵo vivas ĉirkaŭ 3,1 milionon da enloĝantoj je 2001. Fortaleza allogas ĉiujare miliojn da turistoj el tuta Brazilo kaj de cetera mondo

Ĝi estas grava haveno, kiu eksportas kotonon, kafon, felojn kaj aliajn produktojn de la landinterno.

La **43-a Brazila Kongreso de Esperanto** okazis en Fortaleza de la 12-a ĝis la 16-a de julio de 2008. Entute aliĝis 320 homoj kaj el brazilaj ŝtatoj kaj el aliaj landoj. La temo de la kongreso estis “Infano: kia grundo!”

Paralele, okazis la **28-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso** kaj la **7-a Infana Kongreseto**.

#### Ĝenerala programo

Sabato, la 12-an: akcepto de kongresanoj kaj disdono de la kongresaj dokumentoj.



*Solena malfermo de la Brazila Kongreso*



*Argentina ĉefdelegito (nigra antaŭokulo) kun brazilaj geesperantistoj*

Solena malfermo.

La solena malfermo okazis dimanĉo, la 13-an, en la akustika konko de Federacia Universitato de Cearao. Malfermis la laborojn de la kongreso José Passini, prezidento de Brazila Esperanto-Ligo. La veterano Paulo Amorim Cardoso ricevis omaĝon. La paroladon faris profesoro kaj poeto Horácio Dídimo kune kun José Leite de Oliveira Junior. Alvarus Moreno kaj Auzeneide Cândido kantis brazilan kaj esperantan himnojn. Ankaŭ partoprenis per kanto Neide de Barros Rêgo kaj Tarcísio Lima, antaŭ la grupo Quinteto Agreste kaj Cinco em Canto.

La enhaviĉa programo disvolviĝis ankaŭ lunde kaj marde, pere de prelegoj, ekspozicioj, simpozioj, BEL-ekzamenoj, artaj prezentoj (muzika kaj teatra), sportaj ludoj/konkurso, ktp.

Leandro Sousa Moreira estis elektita nova prezidanto de BEJO. Merkredo en Salono Zamenhof, okazis la Ĝenerala Asembleo de BEL kaj la Solena Fermo.

## 3-a Kongreso de Esperanto en ŝtato San-Paŭlo

De la 10-a ĝis la 12-a de oktobro 2008 sukcese okazis E-Kongreso

**K**un partopreno de 92 homoj el kvin brazilaj ŝtatoj, el 26 urboj, okazis en bonega etoso kaj densa programo la 3-a Kongreso de Esperanto en Ŝtato San-Paŭlo, inter la 10-a kaj 12-a de oktobro 2008, en la urbo Lorena. La temo de la kongreso estis: *“Internacia Jaro de Lingvoj”*. Tri atentovekaj rubandoj informis pri la kongreso en oportunaj lokoj en la urbo, jam de dek tagoj antaŭ la malferma tago. Radio Cultura de Lorena kaj Radio Piratinga, en najbara urbo Guaratinguetá, po du fojoj intervjuis pri la evento kaj gazeto “Atos” raportis. Kulturdomo de Lorena vigle apogis per livero de la sidejo, noto en sia programa informilo, aparataro kaj oficistoj. Amaso da

aŭtoritatuloj en la urbo ricevis skriban inviton kaj informojn. La Episkopa Domo senpage disponigis sufiĉe komfortan Komunan Loĝejon.

La kongreson honore prezidis s-ro Milton Serra, pioniro de la movado en la urbo. Krom la organizantoj el Esperanto - Asocio de San-Paŭlo,

sub la estrado de prof-o Genildo M. Coelho, vigle kunlaboris la lokaj samideanoj:



*Partoprenintoj de la 3-a Kongreso, ĉe la monumento al Zamenhof*

Alexandre Prado,  
Genésio Marcondes,  
José P. Bezerra,  
Marli Correia, Sonia  
Ferreira, Delza  
Andrade, João  
Nascimento, Walter  
Brandes, Paulo S.  
Viana.

La malferman ceremonion ĉeestis la reprezentanto de la Sekretario pri Kulturo, kiu salutis kaj donacis materialon pri la urbo al la organizantoj. Pri la temo de la kongreso festparoladis prof-o José Passini, prezidanto

de Brazila Esperanto-Ligo, post kantado de la himnoj kaj salutoj. La malfermo brile finiĝis per pianludado kaj deklamado de prof-o Olavo R. L. Ferreira, filo de aktiva esperantistino en Lorena, kiu forpasis antaŭ kelkaj jaroj. Elizabeth Viana legis la Esperantajn tradukojn de la poemoj.

Dum la kongreso okazis la jenaj prelegoj: “Esprimoj por via sliparo” (Florian Pessoa); “Kio estas fizioterapio: koncepto kaj historio” (Alexandre Prado); “Konkurintoj de Esperanto en la tempo-maŝino” (James Pitton); “Lecionoj de la unua generacio de Esperanto” (Marcos Slotovich); “Esperanto kaj etnaj lingvoj – kiel aldoni vortojn?” (Sylla Chaves); “Neŭrologiaj aspektoj de idealismo” (Florian Pessoa Filho); “Influo de nacia kulturo kaj emocioj sur lernadon de fremdaj lingvoj” (Luiz G. Jardim); “Centjariĝo de la japana enmigrado” (Osmar Alves); “La ignorata Fundamento” (Geraldo Mattos); “Intelekta disvolviĝo de infanoj ĝis aĝo de tri jaroj laŭ Piaget” (Isis Pitton); “Homa Voĉo laŭ muzika vidpunkto” (Alfredo Aragon); “Bazaj principoj de ĝardenkulturo” (Francisco Wechsler); “Alfabetumado” (Sylla Chaves). Dum la dua tago, matene kaj posttagmeze, Jair Salles instruis per “Ekspresa Kurso”. La lastan



*Ĉe la monumento al Zamenhof en San-Paŭlo*

tagon de la kongreso oni okazigis viglan debaton kun partopreno de multaj ĉeestantoj pri la temo de la kongreso, sub kunordigo de la prezidanto de EASP, Genildo M. Coelho. La vesperon de la meza kongresa tago, oni aŭskultis altnivelan violonan kaj gitaran ludadon kaj kantadon, fare de José Inácio, Ivan Guimarães kaj Pedro F. Silva.

Paralele al la oficiala programo, okazis rapidaj demonstroj de kalkulado per abako, fare de José Linck. Dum la kongreso funkciis Libroservo de EASP kaj de Eldonejo “Oportuno”, kiu oni lanĉis du librojn: “*Geedza Kanzono*”, (rakontoj) de Machado de Assis kaj “*Breno kaj Lilika*” (infanlibreto), responde traduko kaj originalaĵo de Paulo S. Viana. Amarílio Carvalho vendadis siajn Esperanto-ĉemizojn kaj Mirna Duarte intervjuis plurajn kongresanojn por sia radiprogramo “Parolu, mondo!”

Post la fermo oni vizitis la monumenton al Zamenhof en proksima placo, kaj tie oni fotis parton de la kongresanaro. Por la proksima kongreso en la ŝtato San-Paŭlo, en 2009, sin proponis grupo el la urbo San-Karlo.

*Informoj kaj fotoj: Aloisio Sartorato*

# Internacie

## ■ Novaĵoj

### “Esperanto”: 364.000 DVD- ekzempleroj

**K**un la simpla titolo "Esperanto", la 10-an de septembro en 2008, aperis DVD kiel aldonaĵo en la grava pola tagĵurnalo *Gazeta Wyborcza* kun la rekorda eldonkvanto de 364.000 ekzempleroj. Ĝi aperis en ĉiuj eldonoj de la gazeto kiel senpaga kromaĵo, kaj la aperigon de la disko en la gazeto financis la urbo Bjalistoko. La diskon kreis la organizaĵo **E@I**. La disko estis kreita laŭ la mendo de la urbo Bjalistoko.

Multaj polaj esperantistoj aĉetadis dum la tago po 10-20 gazetoj kun la disko, kun la celo disdoni ĝin al siaj konatoj kaj por uzi ĝin kiel taŭgan kaj malmultkoston informilon. En la disko "Esperanto" oni promenas kvazaŭ tra fabela, virtuala Bjalistoko kaj vizitas unuopajn konstruaĵojn de la urbo. Ĉiu konstruaĵo havas sian apartan signifon kaj utilon. Aperas konstruaĵoj kiel Lernejo (kursoj de Esperanto de kelkaj niveloj), Kinejo (ses filmetoj pri Esperanto),



Muzikejo (kantoj en Esperanto kun tekstoj), Gazetĝiceto (prezento de kelkaj gravaj Esperanto-gazetoj, Esperanto-muzeo (informoj pri Zamenhof, pri Esperanto-aranĝoj, pri organizaĵoj), Biblioteko (kelkaj famaj verkoj en Esperanto).

La vizitantojn de la urbo (uzantojn de la disko) bonvenigas en la urbodoma konstruaĵo de Bjalistoko la urbestro Tadeusz Trus-kolaski mem per mallonga filmeto – li salutas homojn kaj en la pola kaj en Esperanto.

Legu la tutan artikolon de Peter Baláž en Libera Folio ĉe:

<http://www.liberafolio.org/2008/gazetawyborcza/>-fonto: Ret-Info: <http://www.eventoj.hu>

## Korespondado dank'al Esperanto

**N**i ĉiuj scias, ke kiam oni lernas Esperanton, unu el niaj revoj estas interleteri kun amikoj tra la tuta mondo. Por helpi tiucele UEA kreis specialan servon KSM (Koresponda Servo Mondskala) kiu ĝis nun ebligas kontakti lernantojn kaj ellernintojn de Esperanto por amikiĝi kaj ĉefe praktiki la lingvon.

Lastatempe, tamen, pro populariĝo de interreto, la leterado surpapere iom post iom malmoderniĝas. Sed bonŝance estis kreita novan servon por ret-uzantoj. Jen informo kiu la redakcio ricevis:

“La redaktoro de **edukado.net** informas vin, ke aldoniĝis nova ero al la paĝaro.

Jen estas kelkaj informoj pri ĝi:

Sekcio: Koresponda Servo

Vidu la anoncon en la paĝaro:

<http://www.edukado.net/individuaaj/9814>

[www.edukado.net/individuaaj/9851](http://www.edukado.net/individuaaj/9851)

Momente en la sekcio estas entute 30 grupaj kaj 520 individuaj korespondpetoj el plurdekoj da landoj de la mondo.

Atendas vian viziton la redaktoro de **edukado.net**.



## Eŭropa kanzonamikaro kaj videofilmetoj



Mirinda kaj enhavriĉa ttt-ejo por la ŝatantoj de Esperanta muziko.

Karaj geamikoj,  
Bonvolu viziti niajn paĝojn pri Esperantaj  
kanzonoj:

<http://kanzonamikaro.worsten.org/eo-kanzonoj/videofilmetoj.htm>

En la interreto oni povas trovi kelkcent-  
kanzonojn en Esperanto kaj multajn  
videofilmetojn, kiuj povas pliriĉigi agadon de

lokaj kaj lernejoj Esperanto-grupoj.  
Se nia retejo ekplaĉos al vi, tiam bonvolu  
informi pri ĝi viajn konatulojn.

Kun elkoraj salutoj

Kanzonamikaro el Vroclavo, Silezio, Pol-  
lando: <http://kanzonamikaro.worsten.org>

*Informis: Aloisio Sartorato  
Brazilo*

## UEA-prezidanto Dasgupta okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj

**U**nuiĝintaj Nacioj oficiale ekeksistis la  
24-an de oktobro 1945, kiam la Ĉarton  
ratifis Ĉinujo, Francujo, USSR, Britujo,  
Usono kaj plimulto el la aliaj subskribintoj. La  
Tagon de UN oni festas ĉiujare la 24-an de  
oktobro, ni legas sur la UN-retpaĝaro. Ne en  
ĉiu jaro, ne okaze de ĉiu memorinda tago ni  
trafas interŝanĝi seriozajn pensojn. La aparte  
reliefaj ciferoj -- 50, 60, 100 -- ofte devigas nin  
rigardi realaĵojn, kiujn ni alie nerigardus. Kaj  
tiu prodeviga rigardo ne nepre plisaĝigas nin.  
Tamen, malgraŭ ĉi tiuj ĉiutagaj avertoj pri la  
grizeco de nia kutima psika ĉielo, mi fervore  
petas vin, geamikoj, fidi al la kapablo de la

sistemo de Unuiĝintaj Nacioj iom post iom  
alproksimiĝi al la tasko respeguli la verajn  
kolektivajn pensojn de la homaro, kaj agi  
surbaze de tiuj pensoj. Mi tion diras ne  
malplej pro la media katastrofo, kiu  
disvolviĝas en nia hodiaŭo kaj ombras sur  
nian morgaŭon. Se ne ekzistus UN kaj la  
parencaj sistemoj de ellaborado de  
interkonsentoj, la homaro simple ne  
disponus pri rimedoj kontraŭ tiu ĉi  
katastrofo. Ni ankoraŭ havas la eblon kune  
agi por malebligi, ke la medimisiĝo atingu  
tute krizan skalon kaj neniigu grandan  
parton de la esperoj de la homa specio. =>

Multaj el ni ankoraŭ ne tre intime ligas la temojn de konservo de la vivmedia diverseco kun la konservo de la lingva diverseco, nek la temojn de tiuj konservoj kun la esperoj, kiujn simbolas Esperanto kaj por kiuj laboras niaj lingvanoj. Tute ne volante trudi tagordon al tiuj, kiuj pripense rezistas




ĝin, mi volas tamen uzi la simblan valoron de tiu ĉi tago por atentigi ĉiujn, ke ekzistas tiu ĉi eblo en nia repertuaro. Tiuj inter ni, kiuj pripense rezistas al la tagordo de la multlingvismo, kaj kiuj volas unike Esperanto-parolantan homaron morgaŭ (forgesintan ĉiujn aliajn lingvojn), estas miaj "ne-amikoj". (Tiun ĉi esprimon mi lernis, koresponde, de la granda poeto Jiri Karen, kiu havis "nur amikojn -- la jes-amikojn, kiuj ŝajne konsentas, kaj la ne-amikojn, kiuj ŝajne ne konsentas pri miaj pensoj -- kaj ĉiuj miaj amikoj nutras mian pensipovon".) Mi forte esperas, ke miaj ne-amikoj klarigos al mi antaŭ la Tago de UN de 2009, kiamaniere la homaro konservos sian scian bazon rilate la arbarajn riĉaĵerojn de ekz. Nov-Gvineo, se ĉiuj novgvineaj lingvoj pereos. \_Mia\_ Esperanto estas aliancano de la lingvanoj, kiuj volas, ke ankaŭ iliaj lingvoj daŭrigeble kaj moderne vivu, kun plena konservo de sia tradicia scio-banko. Mi scias, ke aliajn Esperantojn parolas aliaj, kies ideo de moderneco ne baziĝas sur serioza estimo por la scioj de la indiĝenaj popoloj. Mi esperas, ke mi povas paroli kun tiuj ne-amikoj vere komunan Esperanton, per kiu ni pontos trans ĉi tiuj kaj parencaj diferencoj. Mi intence elektis la temon de indiĝenaj popoloj en mondo, kies Unuiĝintaj Nacioj ankoraŭ ne metis antaŭ si formalan celon rekrei sin kiel unuiĝon de popoloj. Eble prave; eble ne la popoloj estu nia privilegia pripensa unuo; pro la leviĝanta konscio pri rasoj, pri seksoj, pri orientiĝoj, pri la apartaj rajtoj kaj bezonoj de

handikapuloj, ni estas prave skeptikaj ankaŭ pri la nacioj. Tamen, io devas funkciigi la trafikajn lumojn, kaj mi restas vetanto je la UN-sistemo, manke de pli bonaj proponoj, kaj pro la granda investo prave farita de la homaro. Mi ne vidas, ke ĉi-momente alian seriozan esperon povas formuli la demokratoj de la mondo. Por reveni al la dialogo kun miaj ne-amikoj - en demokratio, estas aparte grave paroladi trans la baroj, kun la ne-amikoj en la diversaj opozicioj. Altestime al niaj opozicioj, sed espereble ne neglektante miajn jes-geamikojn.

*Probal Dasgupta, prezidanto de UEA*

**AEL kaj la Redakcio  
tutkore deziras al  
ĉiuj siaj legantoj**



**Feliĉan  
Nov-Jaron  
2009**

### Medito laŭ la Paco

Nun mi perceptu atente.

Nun mi vivu en ĝojo.

Nun mi vivu en amo.

Nun mi vivu kaj lasu vivi.

*Alvalo*

### Okazis antaŭ ne longe

- Ĉu via mortinta amiko havis la kutimon paroli kun si mem, kiam li estis sola? Demandis la juĝisto.

- Tion mi ne scias, respondis la atestando.

- Sed vi ja asertis, ke vi estas unu el tiuj, kuj plej bone konis lin.

- Jes, ĝuste tion, respondis la atestanto, sed mi neniam estis kune kun li, kiam li estis sola.

### Proverboj, onidiroj kaj kuriozaĵoj

"Se ni ne havas la kuraĝon vivi kiel pensas, fine ni pensos kiel vivas."

*Victoria Ocampo*

Tiu kiu ne scias, parolas.

Tiu kiu scias, silentas.

*Malnova saĝecero*

En kompanio eĉ morto faciliĝas.

### Transirante en la ruĝa

La unuaj semaforoj kiuj oni instalas en 1868 en la placo de la Parlamento de Londono, ili konsistis en lucerno de gaso ruĝaj kaj verdaj. Ĝis 1930 ne oni konsideris leĝo-rompo la transpaŝon de ĉi tiuj trafik-signaloj.

Redakcio de Argentina Esperanto-Ligo: Calles 119 y 122, AR-H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña, Argentino

Sr/a :

